



Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo

www.espinfo.org/lek

Marto - Aprilo 2021

Kluba programo:

Marto:

5. **Heather Eason (GB):** Karbo, kasteloj kaj kimraj kuketoj.
12. **Flo Martorell (FR):** EUROKKA, Vinilkosmo kaj esperanto-Muziko.
19. **Hanso Becklin (USA):** Kiom religiaj estas Usonanoj?
26. **Istvan Ertl (LU):** La abeloj kaj la nevidebla.



Aprilo:

2. Klubo fermita pro Paska Vendredo.
9. **Lars Sözüer (DE)** BEMI? Vintra biciklado en Svisujo; kun fotoj.
16. **Keyhan Sayadpour (IR):** Gulistan / La Florejo - Persa literaturo en Esperanto.
23. Kluba vespero - programo anoncota.
30. **Ed Robertson (GB):** Ĉu reen al Eŭropo por Skotlando?



Loko, horaro kaj aliaj informoj:

Ni kunvenas vendredvespere. Dum la koronavirusa krizo, kunvenoj okazas per la reta sistemo Zoom, komenciĝante je 19h (UTC). Kunvenoj ĉe Old Diorama Arts Centre neniel povas okazi dum la unuaj monatoj de 2021. Eble ili rekomenciĝos iam en la printempo. Novaj spektuntoj bonvolu peti ligilon al proksim-vendreda Zoom-renkontiĝo de lek.sekretario@gmail.com. Haveblas ankaŭ registraĵoj de prezentoj jam okazintaj (ĉe Jutubo). Vizitu espinfo.org/lekrano

**Londona
Esperanto-Klubo**

Leteroj de la konsilantaro

Mesaĝo de la Honora Prezidanto:

Karaj membroj, Ni jam kutimiĝis al la ideo, ke provizore ni ne povas renkontiĝi persone, ne povas fizike ĉeesti la klubejon, ne povas rekte interparoli unu kun la alia, sed anstataŭe renkontiĝas virtuale, per Zoom. Neniu scias, kiel longe daŭros tiu situacio. Neniu scias, kiam ni revenos al "normaleco".

Pluraj inter ni jam vakciniĝis kontraŭ la kronviruso, kaj la intenco de la brita registaro estas ke iom post iom ĉiuj estu vakcinitaj, tiel haltigante la disvastigon de la tutmonda epidemio.

Intertempe, ni ne pretervidu la tamenajn avantaĝojn de "kunvenado" per Zoom.

Ni okazigas tiujn kunvenojn kunlabore kun la Antverpena grupo, pro kio partoprenas multe pli da homoj en la kunvenoj: ni foje vidas nun publikon de preskaŭ cent personoj. Ni povas ĝui prelegojn eĉ de homoj en foraj kontinentoj, ekzemple de Trevor Steele en Aŭstralio.

Koran gratulon kaj dankon al Renato Corsetti kaj Anna Lowenstein, kiuj aranĝas la teknikan flankon de Zoom-ado kaj admirinde estras la renkontiĝojn.

Ni atendu pacience ĝis ni povos denove renkontiĝi persone, vizaĝ-al-vizaĝe. Ĝis tiam ĝuu la Zoom-adon!

John Wells

Zamenhof, la Londona Esperanto-Klubo kaj la pandemio

En 1903 Zamenhof diris: «Al la noblaj kaj energiaj konduktantoj kaj laborantoj de la Londona Klubo Esperanta nia afero ŝuldas koran dankon.. Esperantistoj en Londono, esperantistoj en Anglujo, laboru kuraĝe kaj energie. ... Granda kaj grava estas via rolo. La tuta mondo esperantista rigardas vin kaj multe de vi esperas.»

En la pasinta marto 2020, kiam la nordlondona sekcio de LEK ne plu rajtis uzi sian centron, unue tio ŝajnis katastrofo, sed oni baldaŭ konstatis, ke eblas

daŭrigi niajn kursojn virtuale, uzante programojn kiel Skype kaj Zoom. Kaj poste venis surpriza malkovro: ke deziras partopreni en niaj lecionoj multaj homoj, kiuj loĝas ekster Londono – kaj ne nur ekster Londono, sed ekster Britujo, eĉ ekster Eŭropo. Ni anoncis niajn kursojn en Meetup, Duolingo, Eventa Servo kaj Facebook. Homoj daŭre respondis, ke ili deziras aliĝi. Fakte eĉ venis tro da petoj, tiel ke ni devis serĉi pliajn instruistojn.



Ĉar multaj petoj venis el Nord-Ameriko, ni havis la ideon serĉi instruiston en Usono, kies lecionoj povus okazi en pli oportuna horo por amerikanoj. Tial ni trovis Hoss Firooznia, kiu inaŭguris novan kurson por komencantoj je la 18.30 laŭ la horo en Novjorko. Krome necesis krei duan kurson por komencantoj laŭ la eŭropa horo, ankaŭ ĉar la novuloj bezonis ekiri de la unua leciono, kaj ne estis oportune aldoni ilin al jam funkcia kurso. Tial ni petis unu el niaj progresintoj, Phil Housley, fariĝi instruisto por la baza nivelo.



Antaŭe ni havis tri kursojn, sed nun ni decidis aldoni kvaran nivelon, kaj denove devis serĉi plian instruiston: tiu estas John Greenwood, kiu legas *Gerda malaperis* kun la grupo de postkomencantoj. Krome, mi menciis la regulajn kunvenojn de Maurizio Giacometto, kiu organizas grupon por konversacio sabate matene. Intertempe aldoniĝis du pliaj kursoj en sabatoj: tiu de Renato en horo taŭga por azianoj, kaj tiu de Anna por klarigi gramatikajn malfacilaĵojn al la lernantoj de Duolingo kaj tiuj de Pawel Fischer-Kotowski kaj Françoise Noireau.

Ni nun instruas al proksimume 150 homoj. Lernantoj venas el tri kontinentoj: el multaj eŭropaj landoj, el 5-6 aziaj landoj, kaj el suda kaj norda Ameriko. Estas proksimume 10 homoj en ĉiu kurso, sed al la sabataj lecionoj por lernantoj de Duolingo venas almenaŭ 30. Por pli da informoj pri niaj retaj kursoj, vidu nian retejon: northlondonesperanto.com/online-esperanto-classes/

La *Londona Kursaro*, laŭ nia kod-nomo, jam havis multe da instrumaterialoj, (kreitaj, por iamaj ĉeestaj kursoj, de ni mem), kiujn niaj instruistoj povas uzi por la baza kurso. Tiuj materialoj akompanas la kurson de Stano Marček *Esperanto by Direct Method*.

Normale en ĉeestaj kursoj ni vendas la libron, sed ĉar tio ne estis praktika por la retaj kursoj, ni kontaktis Stanon, kiu afable disponigis al ni la Pdf de sia kurso, por ke ni utiligu ĝin dum la lecionoj kaj donu ĝin al la lernantoj.

La kursoj estas senpagaj, sed ni decidis peti de la lernantoj malgrandan kontribuon, por kovri niajn elspezojn, precipe la abonojn al Zoom por niaj instruistoj. Kompreneble la kontribuo estas nedeviga, sed multaj homoj eĉ donacas iom pli ol ni petis.

Ĉi tie ni nepre menciis la esencan rolon de Anthony Bodineau, kiu ne nur instruas la komencantojn, sed ankaŭ administras la tuton. Sen lia laborado la pluraj kursoj ne estus tiel sukcesaj. Li dediĉas horojn ĉiutage al mastrumado de niaj kursoj, respondado al informpetantoj, ĝisdatigo de la retejo, pretigado de la propraj lecionoj ktp. – kaj krome li ankaŭ havas sian salajratan laboron. Estas tre malfacile trovi fidindan administranton, kiu laboras regule kaj akurate, sed tia homo estas Anthony.

Ĉar ankoraŭ venadas novaj petoj, ni estas devigataj aldoni pliajn kursojn por komencantoj en la venontaj monatoj. Ofte en la Esperanto-movado la problemoj estas, ke troviĝas entuziasmaj instruistoj kun tute malgrandaj grupoj de 3-4 lernantoj. La Londona Esperanto-Klubo havas la malan problemon. Ni havas multajn entuziasmajn lernantojn, aŭ pli precize, lernuntojn. Mankas al ni nur la instruistoj. Ĉu inter la legantoj de ĉi tiu bulteno troviĝas spertaj instruistoj, kiuj deziras instrui virtuale?

Jen kiel la pandemio helpis al la «noblaj kaj energiaj ... laborantoj de la Londona Klubo Esperanta» respondi al la espero de Zamenhof, en 1903 esprimita per la iom retorika frazo «La tuta mondo esperantista rigardas vin kaj multe de vi esperas.» LEK plue plenumu liajn dezirojn.



Renato Corsetti

Jarkunsido

Laŭ la regularo la jarkunsido devos okazi antaŭ la fino de marto, sed pro la daŭra situacio rilate kronviruson, la konsilantaro decidis prokrasti la kunsidon. Ne eblas por la momento anonci novan daton. Ni esploras la eblecon okazigi ĝin per interreto, sed ni devus solvi ne nur teknikajn detalojn, sed ankaŭ la juran situacion rilate tiujn, kiuj ne havas taŭgan retaliron. Bonvolu atendi plian anoncon.

La konsilantaro

Solve de enigmoj en la antaŭa Bulteno



Kiu-ĉi-tiu?

Ĉiu verso difinas aŭ literon de la koncerna nomo, aŭ grupeton de eblaj literoj:
1(abf) 2(o) 3(ou) 4(al) 5(not) 6(not) 7(amn)
Elektante ĝuste el du- kaj triopoj, oni literumas nomon BOULTON. Tion konfirmas la fina verso, ĉar Marjorie Boulton verkis poemon *La Triopa Memo*, en kiu ŝi sin priskribas unue kiel lektorinon, due kiel amantinon kaj trie kiel poeton.

Jano

1: simpla/alpoj 2: plastro/ortilo 3: stufis/sifiliso
4: tridek/kedivo 5: nenial/laiko 6: tamen/Nemere
7: ekster/retino 8: kvankam/makulo 9: polusaj/jasmeno 10: merito/utila

Londona
Esperanto-Klubo

Funkciuloj (Ankoraŭ rolantaj pro neokazo de jarkunsido de LEK en marto 2020):

Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting. Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson, Anthony Bodineau, Roland England, Terry Page. Maurizio Giacometto (Kompilisto de la Bulteno).